ESPERANTO-PANORAMO NEUBRANDENBURG

eldono aŭgusto 2000

informilo de la ESPERANTO-klubo NEÜBRANDENBURG

# Unua ĉelima Esperanto renkontiĝo de regiono "Pomeranio"

dato : 01-a de julio 2000
loko : vilaĝo Ludwigsburg apud la urbo Prenzlaŭ
partoprenis 22 personoj el Pollando (Szczecin) kaj Germanio (Meklenburgio-Pomerio kaj Brandenburgio).

## 1-e sinprezento

kvankam niaj regionoj situas rekte apud la landlimo, la Esperanto-amikoj preskaŭ ne konis sin, ĉar kontinua kunlaboro inter la kluboj ne okazis.
Dum la interkonatiĝo ni tamen rimarkis, ke foje kelkaj el ni iam renkontiĝis tio tre stimulis la temon : "Ĉu vi memoras?".
La germanoj tre ĝojis, ke pola delegacio akceptis nian inviton kaj venis al nia renkontejo.

## 2-e la ĉevalkorto

Familo Hennig plenumis sian revon pri fondo de ĉevalkorto, ĝi malfermiĝos ĉisomere, sed devas starti sub tre tre komplikaj cirkonstancoj. Gerhard Hennig montris al la ĉeestantoj la dekdu ĉevalojn (kelkaj el ili havas dramecajn biografiojn), la paŝtejon, saltosportejon por ĉevaloj kaj la grandegan kvaretaĝan iaman grenejon (ĝi poste estos la centra konstruaĵo por rajdistoj kaj feriantoj).
Post kelkaj jaroj la ĉevalkorto situas rekte apud kruciĝo de aŭtostratoj Lubeko-Prenzlaŭ kaj Berlin-Stralsund - ni deziras al familio Hennig (amikoj de ĉevaloj kaj Esperanto) bonŝancon kaj kuraĝon por ilia entrepreno.

## 3-e libera parolado

la glacio rapide rompiĝis kaj ni pridiskutis ĉiujn eblajn temojn, formiĝis rondetoj kiuj grupe babilis kaj ni restis pli longe, ol ni antaŭvidis.

## 4-e rezultoj

Jam en nia invito ni substrekis, ke ni ne planu iun konferencan programon, sed donu vastan spacon al la individuaj renkontiĝoj kaj interparoloj (el tiuj senplanaj kunvenoj tre ofte elkreskaj la plej interesaj ideoj).

Ni interkonsentis

- a) Ĉiujare okazu unu ĉelima renkontiĝo - alternante en Pollando kaj Germanio - plej proksime je la limo (regiono de urboj Szczecin – Pasewalk/Prenzlaŭ).
- b) la venonta ĉelima renkontiĝo okazos maje 2001 en Szczecin.
- c) la klubaj estraroj informas kaj invitas al siaj gravaj/internaciaj aranĝoj.
- d) sro. Jerzy Oginski prizorgos kurson de semajnfina seminario en Neŭbrandenburg (27-a ĝis 29-a de oktobro 2000).

## 5-e dankoj

- - al ĉiuj, kiuj kuraĝe venis kaj aktive partoprenis,
- -al ĉiuj, kiuj zofĝis pri la organizo kaj kuiro de manĝaĵoj,
- -al familio Hennig, Kiu senpage permesis kunveni en la klubejo,
- - al ĉiuj, kiuj pagis la elspezojn (ni ekzakte kolektis tiom, kiam ni antaŭe eldonis), nun restas manĝilaro, teleroj, tasoj ktp. por venota komuna manĝo).

## 35-a Semajnfina Esperanto-Seminario, kora invito

kie: urbo Neŭbrandenburg, strato: Mlada Boleslav 1, junulara klubejo,
kiam : 27-a (19.00 horo) ĝis 29-a (12-a horo) de oktobro 2000
kion oni ofertos : konatiĝa kurso, kurso por progresintoj, konversacia rondo.
kiel aliĝi : je la prezidanta adreso de la klubo.
kostoj : ni ofertas laŭ via anonco konvenan hotelon, por manĝoj/ trinkaĵoj/ teknika prizorgo ni kolektos monon (ĉirkaŭ 30 markoj).

### INVITO
### al la LANDA-ZAMENHOF-TAGO 2000 kaj al la
### solenaĵo "30 jarojn kunlaboro inter la kluboj Neübrandenbura kai Koszalin

dato : 02-a de decembro 2000
loko : Neŭbrandenburg, Haus der Kultur und Bildung (domo de kulturo kaj edukado)
daŭro : 09.30 ĝis 17.00 horoj,
programo :

- \- bonvenigo, salutvortoj, salutskribaĵoj,
- \- kultura bonvenigo,
- \- prelego : "Kiun konsilon al ni donus nuntempe dr-o. Zamenhof ?",
- \- 30 jarojn partnera kunlaborado inter la kluboj Neŭbrandenburg-Koszalin,
  (pririgardo de pola kaj germana flankoj, po ĉirkaŭ 15 minutoj),
- \- kulturaĵo,
- \- "95 jarojn E. en Meklenburgio-Pomerio"
  videoprezentaĵo kaj enkonduko en la kompaktdiskedon,
- \- kafoklaĉo, la geamikoj vizitas sin je ĉiuj tabloj,
- \- adiaŭo

Jen la nomoj kaj adresoj de nia kluba estraro :

| |
|---|
| prezidanto : Brunhilde Pfennig,<br>(adreso vidu supre)<br>membroj: Edeltraut Henning, (kroniko) - DE 17291 Prenzlau,<br>Ursel Ahlsdorf, (financoj) - DE 17033 Neubrandenburg, Johanna-Beckmann-Ring 17, telf. 0049395 5825616<br>Werner Lewien,(redaktoro de informilo, publika laboro) - 17036 Neubrandenburg, Ernst-Alban-Str. 26, telefono 0049395 7073109,<br>Werner Pfennig, (instruada, publika laboro) - 17034 Neubrandenburg, Uns Hŭsung 29 / 1104 telefono : d : 004939 |

krome laboras ĉe ni memstaraj junularaj grupoj:

| |
|---|
| prezidanto: Edeltraut Henning, DE 172291 Prenzlau, Winterfeldstr. 30, telefono: 00493984 807647 |

| |
|---|
| prezidanto: Roswitha Lindner, DE 17034 Neubrandenburg, Wartlaustr. 14, telefono 0049 395 5825023 |